10a. Jaro No 6 (114) VERSCHIJNT MAANDELIJKS DECEMBRO 1938

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA ESPERANTO MOVADO

N.E.L.E. (Nia Estas La Estonteco)
Flandra Esperantista Grupo

ENHAVO:

1. X-a JUBILEA KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA. 2. KOMUNIKOJ DE LA ESTRARO.— 3. KION MONERO RAKONTIS.— 4. ILUZIOJ.— 5. DIVERSAĴOJ.— 6 BIBLIOGRAFIO.— 7. ESPERANTA LINGVA KOMITATO AKADEMIO.— 8 INTER NI.— 9. ANGULO DE LA SERĈEMULOJ.

Orgaan van den

VLAAMSCHEN ESPERANTISTENBOND

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.
(Vlaamsche Esperantisten - Bond)

HOOFDBESTUUR :
Voorzitter : H. Rainson, Steenweg op Hombeek 54, Mechelen.
Ondervoorzitter : E. Cortvriendt, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W.
Sekretaris : G. Debrouwere, Magdalenastr. 29, Kortrijk Tel. 1654.
Penningmeester : A. De Keijzer, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.

DIENSTEN :

Tentoonstellingsmateriaal : G. De Boes, Wijnstraat 81, Ronse.
Grupkonsilanto : A. De Troeyer, Vrijheid 98, Arendonk.
Kursussen : H. Rainson, Stw. op Hombeek 54, Mechelen.
Voordrachten : A. Ackaert, Frankenstraat 3, Brussel.
Pers : G. Debrouwere, Magdalenastr. 29, Kortrijk.

AFDEELINGEN TE : SEKCIOJ ĈN :

Aalst, Aarschot, Alveringem, Antwerpen, Anzegem, Arendonk, Avelgem, Beersse, Berlaar, Bertem, Blankenberge, Bornem, Breedene, Brugge, Brussel, Deinze, Denderleeuw, Diest, Diksmuide, Erembodegem, Gavere, Gent, Harelbeke, Heist op-den-Berg, Heist op-den Berg (Goor), Herenthout, Kasterlee, Koekelare, Kontich, Kortemark, Kortrijk, Kuurne, Langemark, Lebbeke, Leuven, Lichtervelde, Mechelen, Meenen, Merchtem, Meulebeke, Middelkerke, Mol, Nederbrakel, Ninove, Oostende, Oostmalle, Oudenaarde, Oud-Turnhout, Poperingen, Putte, Puurs, Ravels, Roeselare, Ronse, Staden, St Amands, Tervueren, Tielt (W. Vl.), Tienen, Torhout, Turnhout, Veurne, Vichte, Vilvoorde, Vlamertinge, Waregem, Wervik, Wetteren, Wevelgem, Willebroek, Wilsele, Wingene, Woumen, Zottegem, Zwevegem.

VERTEGENWOORDIGERS TE :
REPREZENTANTOJ EN :

Assche (Brab.), Hamme (Oost Vl.), Mortsel, Munkzwalm, St. Truiden.

ORGAAN :

« Flandra Esperantisto » verschijnt maandelijks.
Redaktie : Ten Eeckhovelei 125, Deurne-Noord (Antwerpen).
Kopij : uiterlijk 15-en ieder maand bij de redaktie.
Administratie : Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.
Advertenties : barema op aanvraag.

LIDMAATSCHAP :

Leden-abonnenten : fr. 25 's jaars.
Eenvoudige leden : fr. 5 's jaars.

POSTREKENING :
2321.50 van Flandr. Ligo Esperantista, Brussel.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas :

Flandra Ligo Esperantista!

10a-Jaro - No 6 (114) Decembro 1938

FLANDRA ESPERANTISTO

ORGANO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO: Ten Eeckhovelei 125 Deurne - Noord Antwerpen.
ADMINISTRACIO: Vlaamsche Stw., 70 Brussel P. K. : 2321.50 de Fl. L. E

Jara kotiz-abono Fr. 25 APERAS MONATE

X-a Jubilea Kongreso de Flandra Ligo Esperantista

Antwerpen, 27-28-29 Majo 1939.

UNUA KOMUNIKO !

En unua komuniko estas iel la kutimo esprimi sian ĝojon ĉar oni estas vokita al honoro kia organizadi Kongreson ; kio iĝas postulo ankoraŭ pli urĝa kiam temas pri Jubilea Kongreso !

Nu, Flandrema Grupo Esperantista plene konscias tion kaj vere fieras, sed ĝi ne forgesis ke la dorsa flanko de honoro estas ŝarĝo : ankaŭ tion ĝi ne neglektas kaj ĝi nenian penon ŝparos por, ne mankante al siaj devoj, porti tiel pezan prirespondon.

Post tiu deklaro, kiu eble ŝajnos superflua, ĉar tute natura, ni donu al Vi la unuajn informojn kaj faru la unuajn instigojn. Estu tamen antaŭdirite ke, pro klareco, ni opiniis dezirinda enŝovi tiujn sciigojn en rubriketojn : konsiderinte la utilecon de la procedon, vi pardonu ĝian rigidecon !

1. — *Elekto de Loka Kongresa Komitato :* post mallongaj doloroj ,legu balotoj !) F. G. E. prezentis al la popolo feliĉa sian naskkvinon, nome E. Verheyden, T. Van Gindertaelen, J. Van As, F. Volders kaj Maria Van der Mast. Post interkonsiliĝo, oni decidis ke tiuj LKK-anoj postenos respektive kiel prezidanto, sekretario, kasisto, festdirektoro kaj asistantino ; ili plie rajtos mem elekti laŭbezone personajn kunlaborantojn. Tiu LKK, kiu intencas cetere esti tiel laborema kiel la antaŭaj, estis tuj nomita : « Komitato de l' kvin Vo-j » kredeble ĉar ĉiuj nomoj komenciĝas per vo, vo kiel venko...

2. — *Programo :* estas kompreneble iom tro frue por komplete disvolvi ĝin sed ni jam povas anonci ke, krom la kutimaj punktoj okazos sabatvespere, antaŭ la balo, la *unua* prezentado de « Levu la manojn », originala komedio el la plumo de la bone konata aŭtoro de « Kia Miksaĵo », sano F. V. Dorno ; la aktoraro estos la teatra sekcio de Turnhout kies meritoj kaj talento ne

plu estas substrekendaj. La dimanĉa vespero estos plenigata per granda Balo kun specialaj unuaklasaj atrakcioj. Rilate Lundon, la klasikan ekskurstagon, kelkaj proponoj estas jam deponitaj kaj ni atendas ankoraŭ aliajn. Ni plie memorigu al Vi ke la Liga Flago estos solene « inaŭgurata » dimanĉmatene.

3. — *Aliĝoj :* Dum la lasta Ligkunveno la kotizoj estis fiksataj jene : por anoj de Fl. L. E. 12.— fr. ; por aliaj samideanoj : 15. — fr. Notu ke tiuj prezoj, kvankam ili rilatas partoprenon al Jubilea Kongreso estas mem tute ne jubileaj : ili estas samaj kiel en la antaŭaj kongresoj... Tamen tio validos nur ĝis unu semajno antaŭ Pentekosto : poste ili iĝos respektive 15.— kaj 20.— fr. Tial ne hezitu tuj aliĝi kiam vi ricevos la aliĝilon : cetere tio ne estos malfacile al Vi, ĉar la aliĝilo mem estos tiel plaĉaspekta, tiel alloga ke vi kvazaŭ aŭtomate plenigos la blankajn lokojn kaj havigos la sumeton al la Kongresa Kasisto. Tiel cetere vi permesos al ni publikigi, jam venantmonate, unuan liston de Kongresanoj.

4. — *Glumarkoj :* Jam de kelka tempo niaj glumarkoj estas eldonitaj : kelkaj sekcioj kaj samideanoj jam aĉetis ilin, tiel ke la duono de la kvanto estas for. Ni nun varme incitas vin fari novan aŭ unuan mendon ĉe la Kongresa Kasisto. Ekster ke ili estas tre belaj, ili ne kostas multe : 9 fr. po 100 ; 5 fr. po 50 ; 1 fr. po 10. Glumarko estas efika propaganda elemento, ne forgesu : ĉar letero vojaĝas, iras de mano al mano..... Tial profitu la okazon konigi al multaj nian X-an !

5. — *Informoj :* ĉiujn informojn, demandojn kaj viajn bonvenajn sugestojn sendu al la Kongresa Sekretario : T. Van Gindertalen, Stefaniestraat, 44 Antwerpen.

6. — *Pagoj :* ĉiujn pagojn direktu al la Kongresa Kasisto : J. Van As, Dambruggestraat, 46, Antwerpen aŭ ĝiru je lia P. Ĉ. K. nº 422.784.

Jen, karaj gesamideanoj, la unuaj informoj pri tiu komuna aventuro, kiun oni nomas Kongreso : de nun, ni ĉiumonate ĝistagigos ilin kaj komunikos la lastajn novaĵojn kaj aranĝojn.

Kompreneble, multaj aferoj estas ankoraŭ pritraktotaj por atingi kion ni deziras, nome ke Vi ĝuu indan Jubilean Kongreson kaj kunportu pri ĝi agrablajn rememorojn..... Ni dezirus ke tiu Kongreso estu impona : ĉu ĝi ne estas la lasta de serio da ĉiujaraj laboroj, dediĉo kaj progreso, kaj ĉu ne necesas tiam ke ĝi estu supera, signifoplena en ĉiuj rilatoj ?

Jen unua kialo por esti multnombraj !

Sed restas alia argumento : ĝi estas pli praktika, sed sendube konsiderinda ; Vi scias ke Antverpeno estas dece brila kadro por Jubilea Kongreso, ke ĝi estas dece granda urbo, sed estas ora kadro, kaj malkara urbo... Nu, ni povas garantii ke ĉio estos akirebla je la *ordinaraj prezoj* se ni estas proksimume 400-ope... Kaj tio eblas... Se vi nur volas — kaj vi volas — sincere kunlabori, ĉiuj, propagandi kiam necesas, kaj helpi nin laŭpove, ekzemple ne prokrastante vian aliĝon, akirante glumarkojn, kaj instigante viajn geamikojn kunvojaĝi al Antverpeno, nu, tiam, ni estu certaj pri la sukceso de la X-a, sukceso kiu estos tiu de nia samideana kunlaboro kaj sukceso por la Esperantismo en Flandrujo !

T. Van Gindertaelen, *Sekretario de LKK.*

GENERALA LIGKUNVENO okazos en Brussel, dimanĉon, la 11-an de decembro je la 10-a matene en « Vlaamsche Club », Em. Jacqmainlaan 121 (proksime de la norda stacidomo) Pro la graveco de la tagordo de tiu laŭstatuta ĝenerala ligkunveno, ni esperas la ĉeeston de *ĉiuj* niaj sekciaj delegitoj kaj de niaj lokaj reprezentantoj.

TAGORDO :

1) Raporto pri la antaŭa ĝenerala kunveno.
2) Nia X-a jubilea kongreso en Antwerpen.
3) Laŭstatuta reelekto de parto de la estraro.
4) Fiksado de la ligaj kotizoj por 1939.
5) Ekzamena komisiono.
6) Liga Flago.
7) Diversaj komunikoj kaj ronddemandoj.

Pere de « Konunikoj Nº 7 » ni sendis al la sekretariejoj de niaj sekcioj la proponojn de la estraro koncerne tiun-ĉi tagordon. Tiujn proponojn niaj sekcioj ekzamenu dum la grupkunvenoj ; pri ili okazos voĉdonoj dum la ĝenerala ligkunveno.

LIBRO-LOTERIO F. E. I. — Ĉiuj niaj sekcioj ne ankoraŭ mendis kvanton da biletoj de nia loterio por disvendi dum la grupkunvenoj. Ili konsciu ke ĉies kunlaboro estas necesa por ebligi baldaŭan tiradon. Ekzamenu la trian kovertpaĝon de tie-ĉi numero kaj tuj mendu kvanton ĉe nia Instituto !

Kion monero rakontis.. .

de Pol Van der Poel.

La nikelaj Dudekfrankmoneroj ja estis tro pezaj en la poŝoj kaj post mallonga vivo jam la mizeruloj estis kondamnitaj je morto. Sonantaj arĝentaj moneroj anstataŭis ilin, kaj forgesitaj ili nun kuŝis en grandaj sakoj en la monŝranko de la nacia banko.

— Kiel vi ankoraŭ brilas, diris unu monero al alia, kiu kuŝis kontraŭ ĝi, certe vi havis brilan vivon !

— Hm, respondis la radianto, mi dum tiuj kvin jaroj restis en infana ŝparpoto. Kia teda, malĝoja vivo... Sed ĉu eble vi, kiu ŝajnas vere maljuna, kies brilo estas for, ĉu vi eble havis iun aventuron ?

— Mia vivo estis tre agema...

— Ho, rakontu al ni tuj, kriis diversaj scivolemaj kunsortanoj.

— Estas tro longa...

— Ne ! ne ! ni havas tempon, kaj plie, tio forpelas la enuon.

— Nu, reparolis la malhela disketo, se vi volas, mi klopodos ĉion rememori...

Kaj tintetis nun eĉ ne unu peco en la sako, kaj ĉiuj aŭskultis, auskŭltis.

Jam la unuajn tagojn post mia naskiĝo, ekrakontis la parolanto, mi forlasis la bankon kun kelkaj centoj de miaj kamaradoj. Aŭtomobile ni veturis al granda fabrikejo kaj jam la saman tagon mi kuŝis en la monujo de laboristo.

Strange, kvankam li ricevis min kun aliaj fratoj, mi estis enkarcerigita en aparta fako de la monujo, kaj tion farante la viro diris rikanante : — Vi estas mia privata proprajo !

La saman vesperon, fanfaronante li ĵetis min sur la tablon en kafejo. Sed en la tirkesto mi nur restis duonhoron, ĉar interŝanĝante cent-frankbileton, la kafejestro min jam transloĝigis en la mano kaj poste en la poŝo de alia viro. En la pantalono de ĉi tiu mi tranoktis.

La sekvontan tagon mi revidis la taglumon en tabakmagazeno, kaj tie mi restis dum du aŭ tri tagoj... La ricevisto de l'elektra servado min kunprenis en sia sako, kaj dum monato mi estis enkarcerigita en la monkesto de l' kontoro.

Estis denove, okaze de salajra pagado ke mi forlasis tiun tedan lokon. Oficisto min donis al sia edzino, dirante : « Rigardu, tio estas la unua dudekfrankmonero kiun mi vidas... Sed mi ja preferas la biletojn, kiuj ne tiel pezas en la monujo. Evidente mi tre koleris pro tiuj ofendaj vortoj, sed la homoj ja ne komprenis mian lingvon kaj mia protesto do estis vana.

Dum duona monato mi loĝis tie. Kaj estas unu el la plej strangaj okazintajoj el mia vivo, kiun mi spertis ĉi-tie. En tiu hejmo la kato havis kutimon, kiu ne tre plaĉis al la mastrino, ĝi ĉiam forkuris... Tiam mi estis kvazaŭ vekilo, kvazaŭ sireno !... Kiam do la virino volis altiri ĝian moŝton la katon, ŝi prenis min el la monskatolo, faligis min kontraŭ la ŝtonoj, kvin, dek fojojn, kaj la kato alrapidis, intencante ludi per mi, sed tuj mi ree malaperis en la skatolo... Nia kato estas vera « arivisto » diris la edzo, nur la sono de la mono altiras ĝin !

De tie mi forvojaĝis per la fervojo al la najbara granda urbo. Dum kelkaj tagoj mi restis en la fera kasto de l' ĉefkasisto, kaj poste alvenis en privata banko. Mi jam timis novan monaĥan vivon en la malhelaj keloj, sed kia feliĉo, la ĉefkasisto, kiu iun tagon ŝajnis malsaneta, eble pro troa manĝado kaj trinkado, ne klare vidis el siaj okuloj, preskaŭ falis kontraŭ seĝo, sed klopodante teni la ekvilibron, li faligis la lignan kesteton en kiu mi kuŝis inter aliaj kamaradoj, kaj surteren mi tuj kuregis inter fendo de l' planko, ĝuste sub la centra varmigilo. Li blasfemis kaj ekkolektis la viktimojn de tiu katastrofo ; sed duone kaŝita en la planko fendo, en la ombro de la varmigaparato, li ne malkovris min, kaj terure grumblante li hejmeniris tiun tagon. Preskaŭ dum tuta semajno mi restis tie, ĝuante de la plej bela libereco. Mi povis vidi ĉion, sen

esti vidata...

Iun matenon purigistino per longa broso min vipis en la vizaĝo kaj kuntrenis min nekonscie en la lumo... Ŝiaj okuloj brilis kiam ŝi prenis min inter la fingroj ; ŝi ŝajnis heziti kaj tiam min metis en la poŝon de sia antaŭtuko... Ĉiujn du minutojn min karesis volupte ŝiaj fingroj ; ŝi ludis kun mi, sendube pro ĝojo por mia posedo. Kiam la ĉefkasisto alvenis, de el alia kontoro ŝi ekŝvitis pro emocio. Sed fine ŝi decide iris al la viro, kaj rakontis lin kiel ŝi estis trovanta min. Mi malaperis en la monujo de la oficisto, sendube en la loko de kolego kiu nun estis monkest-monaho anstataŭ mi.

Estis denove en kafejo ke mi eliris mian mallarĝan restadejon. Sed tiam mi travivis tiel viglajn horojn, ke ne estas ebla ĉion rememori. Dum du aŭ tri monatoj mi preskaŭ ĉiun tagon ŝanĝis de posedanto : bakistoj, ŝufaristoj, legomvendistoj, kuracistoj, cigarkomercantoj, bierfaristoj, kaj tiel plu, kaj tiel plu... Nenio speciala okazis, sed la vivo estis plena je diversajoj kaj amuzajoj.

Tamen aventuroj, kiujn mi neniam forgesis, atendis min. Finfine mi estis en la mano de forĝisto.

Jam li interdisputis kun kunlaboristo pri vetludo de piedpilkpronostiko, laŭ kiu la unua devis pagi kvin frankojn al la dua ; sed la unua rifuzis.

— Vi ne havas plu da mono, kriis la dua.

— Ne ! fanfaronis la unua... Ne... Kaj li prenis min en siaj nigraj fingroj... Ne !... Rigardu nur !... Kvarfoje kion vi postulas !... Sed vi malpravas, kaj nenion ricevos...

— Vi perdis kaj vi pagos !

— Ha ! ha ! ha !

— Pagu, ŝtelisto, ekvokis la dua kolere.

— Kion vi diris ?

— Ŝtelisto !

Ili interbatalis. Mi falis surtere. La dua ege batis la unuan, tiam tuj leviĝis, prenis min, forkuris, kaj antaŭ ke mia posedinto povis alveni, li batis min per granda martelo.

— Jen ! kriis la alia. Mi ne volas vian monon, kaj li forjetis min al la kapo de mia mastro.

Tiu lasta rigardis la vundojn, kaŭzitajn per la martelo, sed vere ne tre gravis, kaj fine, eble kontenta ke li ne devis pagi, li denove metis min en sian monujon.

Tiuj vundetoj, kiuj verdire ne gravis por mia sano, tamen kaŭzis ke la sekvontan dimanĉon, oni kondamnis min je morto, kiun nur herezulo el la mezepoko meritis !

Tiun dimanĉon, nia forĝisto intencis viziti sian maljunan onklon, loĝanta en vilaĝo ne malproksime de la urbo. En la stacidomo li demandis vojaĝkarton kaj pagis per mi.

Kun okuloj de nova Ŝerlok Holmes, la oficisto min prenis en la mano, pristudis miajn vundojn kiel lerta kuracisto, faligis min sur marmora tableto, kaj hezitis.

— Estas bona monero, laŭdis mia mastro.

— Kaj mi diras ke estas malbona, sinjoro, respondis la oficisto nun, kaj mi tuj distrancos ĝin.

Li forlasis la ĝiceton, dume mia mastro kriis kvazaŭ estis li mem kiu estis kondamnita.

Mia ekzekutisto kun grimaco sur la lipoj paŝis al turmentegilo, kiu similas al eŝafodo. Ho ! mi denove ekŝvitas kiam mi pripensas tiujn angorajn momentojn. Jam mi estis en duoncerklo, kiu kvazaŭ estis fabrikata laŭ mia formo kaj mezuro, kaj guste ĉirkaŭprenis min... Jam brilis la mortiga trancilo !... kiam savanta anĝelo, mia defenda advokato, haltigis la manon de l'ekzekutisto.

— Ĉu vi estas certa, diris tiu kolego de la unua, sendube sub la influo de mia protestanta mastro, kiu emociigis la stacidomon. Jam dudek personoj alrigardis antaŭ la ĝiceto.

La savanto prenis min de la eŝafodo, ankaŭ rigardis min plej atente, faligis min ree sur la marmorajo kaj deklaris :

— Oni nur misformis ĝin per peza objekto, sed ne estas falsa monero. Ho ! se tiam ankaŭ mi estis konanta la lingvon de l' homoj, mi certe je sankta indigno estus protestanta... Mi, falsa monero ! Mi, kiu devenis el la reĝa monfarejo !... Sed mia ĝojo estis tiel granda, ĉar tiam mi komprenis la grandan valoron de la vivo, eĉ se ĝi estas malriĉa kaj ŝajnas teda.

Mia ekzekutisto ankoraŭ dum momento hezitis, kaj pripensis eble la sekvojn de justeca eraro, kaj tiam li cedis pro la justa pledado de mia advokato..... La publiko vigle priparolis la proceson, tiel laŭte ke ŝajnis malgranda ribelo, kaj la polico de la stacidomo forlasigis la lokon.

La oficisto, kiu fine akceptis min, tamen malfidis la aferon, ĉar li ne gardis min en lia kaso, kaj tuj mi alvenis en la monsaketo de dancistino, kiu interŝanĝis kvindekfrankbileton.

Kia kontrasto ! El la infero de nigra, malbonodora monujo, grasa kiel lardo, mi flugis en la ĉielon de vataj kusenetoj, kie flirtis aromoj de rozoj, violoj, diantoj kaj jasmenoj. Mi tuj alkutimiĝis al tiuj parizaj moroj, kaj estis pudrita kaj pripentrita kiel mia nova mastrino.

Sed, malfeliĉe, ne eterne daŭris tiu revo... Ce dancistino ĉio dancas, ankaŭ la mono, kaj tuj mi fordancis el la vata lito... denove sur malmola fera fundo de monkesto en modomagazeno.

Mi.....

* * *

Jus tiun momenton iu forprenis la monsakon el la banka monkestego. La moneroj ruliĝis haose en aliaj direktoj kaj se nia heroo, ne jam soifis pro la longa parolado, li povis rekomenci, ĉar aliaj nun ĉirkaŭigis lin...

ILUZIOJ

Maljuna poeto, jam sola sur tero
En verkoj malnovaj je iu vespero
Revidis poemojn el sia junec',
Relegis la kanton pri granda belec'

De lia unua kaj ĉarma knabino ;
Per kiom da fajro, obstina rutino
Li rimis la versojn, kaj sentis pri am'
Dekiu longtempe formortis la flam'.
Nur strangan rideton sur lia vizaĝo
Ekvekas ĉi tiu junecmemorajo,
Ĉar preskaŭ li ne rememoras pri ŝi.....
De l' granda pasi' restis nur iluzi' !

Sed ankaŭ li vidis en sama libreto
Aliajn poemojn pri ama sekreto
El kiu naskiĝis nur melankoli' ;
El kiu naskiĝis nur melankili' ;
Longtempe ĝi regis per ama magi'
En koro diskreta de la naivulo,
Vivante ekstazon de la somnabulo.
Li kantis pri rido, saluto, parol'
Kaj pri flekseblec' de malforta la vol'.
Eterne ja ŝajnis la fajra deziro
Kaj plendis li orile en akra satiro.
Dum jaroj li vane esperis ; sed ŝi
Denove por li estis nur iluzi...

Pri lia edzin'li revidis la centon
Da verkoj, formanta ja amdokumenton :
Priskrib' de l' vekiĝo de tiu ĉi am',
Prikanto de l' unua kiso ; roman'
Reala de longaj piedpromenadoj,
Pri balo kaj pri mezepok-serenadoj.
Admiris li kapon kaj buŝon, okulojn
Brilantajn, kaj gaje ricevis gratulojn.
Edzigo ĉiela ! li kantis ekstaze,
Eterna feliĉo ! li rimis emfaze...
Sed post la edziĝo subite ja ŝi
Fariĝis denove de l'am'... iluzi' !

Pol van der Poel.

DIVERSAJOJ

E-ELSENDO PERE DE N. I. R. OKAZE DE LA ZAMENHOF-TAGO. — La 14-an de decembro N. I. R. (Nederlandlingvaj elsendoj) je la 19-a horo elsendos dum 30 minutoj belan E-programon. La aranĝon prizorgos « Brusela Esperanto-Kanthoro » (horestro A. Isaya, teknika gvidanto F. Buenting). Nepre aŭskultu kaj ne forgesu vian devon : danki N. I. R. (Flageyplaats, Brussel) citante *vian organizon* Fl. L. E. !

« 1-a E-KARAVANO AL EGIPTUJO ». — Egipta E-oficejo por turismo (strato Mokattam 10, Port Said) aranĝas rondvojaĝon.

de la 21-a ĝis la 27-a de decembro, en la lando de la sfinkso kaj piramidoj. Tuta kosto po partoprenanto : 7,5 anglaj funtoj. Interesiĝantoj petu aliĝilojn kaj aldonajn informojn al la citita adreso.

NEDERLANDA KONGRESO « ESPERANTO EN LA LERNEJO » okazis en Den Haag la 5-an de novembro en la granda salono de la Zoologia Ĝardeno. Ĝin ĉeestis proksimume 1.200 interesiĝantoj. Pluraj eminentuloj paroladis pri E. senescepte en laŭda senco. Kun granda entuziasmo oni akceptis sekvan mocion : La kongreso, aŭdinte la enkondukojn de delegitoj de gravaj religiaj kaj politikaj popolgrupoj.

Konstantante la ĉiam kreskantan, kaj ankaŭ en aliaj landoj sentitan neceson pri mondhelplingvo por la internacia interkontakto, konvinkite ke tio eblas okazi sen altaj kostoj por la komunumo, petas la landregistraron kaj popoldelegitaron :

1) Akcepti E-on inter la fakultativaj fakoj, nomitaj en la art. 2 de la elementa instruleĝo.

2) Instruadi E-on en la porinstruistaj lernejoj.

AŬSKULTU LA REGULAJN DISSENDOJN :

Dimanĉe :

8.45 — 9.00 Lille : Esperanto-kroniko.
9.10 — 9.25 Kortrijk 204 : Esp.-kroniko de G. Debrouwere.
18.00 — 18.30 Reykjavik 1442 : Esp.-kurso de Th. Thordarson.
21.30 — 21.45 PRC 7 Mineira : Momento de Esperanto.

Lunde :

17.20 — 17.35 Suisse Romande 443 : Esp.-kurso de P. Bouvier.
18.45 — 19.00 Montpellier - Languedoc 224 : Kroniko de A. Capoulade.
19.00 — 20.00 JV 2 RL Caracas 51.72 : Parolado.
19.30 — 19.45 PRA 8 Pernambuco 720 : Kurso sub la patroneco de la Departemento de Nacia Edukado.
20.50 — 21.05 Roma 2 RO 31.13 : Radio-ĵurnalo.
22.45 — 23.30 Paris 431 : Esp.-teatraĵo.

Marde :

20.20 — 20.35 Kaunas 1935 ; Klaipeda-Memel 531 ; Lyiae 41 : « Nia anguleto ».
21.00 — 21.10 Türi 410 ; Tartu 579 ; Tallinn 229 : Esp.-kroniko.
21.25 — 21.40 PRF3 Sao Paulo 860 : Informoj kaj kurso.
22.30 — 22.45 PRF5 31.58 ; PRF2 Rio-de-Janeiro 780 : Informoj kaj kantoj dum « Horo de Brazilio ».

Merkrede :

1.45 — 2.45 XECR Mexico 50.17 : Informoj.
14.00 — 14.20 Paris 431 : Esp.-kurso de C. Rousseau.
20.00 — 20.30 LTI Rosario 384 : Esp.-kroniko.

Vendrede :

1.45 — 2.45 XECR Mexico 50.17 : E.-kroniko.
21.20 — 21.35 Brno 325, Praha 470 kaj aliaj čsl. stacioj : Esperanto-kroniko.

Sabate :

9.30 — 10.00 7 HO Hobart : Esp.-kroniko.
13.45 — 14.00 Lille 247 : Esp.-kroniko de f-ino André kaj R. Cornelle.
16.15 — 16.30 Loksbergen-Limburg 202 : Esp.-kvaronhoro.
18.01 — 18.18 Roma 420 ; 2RO 31.13 : Turisma kroniko.
21.25 — 21.40 PRF 3 Sao Paulo 960 : Informoj, kantoj, kurso.
23.30 — 24.00 Barcelona 377 kaj 42 : Parolado.

Ĉiuloke oni festas la centjaran datrevenon de la apero de la majstroverko de Hendrik Conscience : » LA LEONO DE FLANDRUJO ».

Tiun libron tradukis H. J. Bulthuis, lingva komitatano kaj ĝi estas rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio.

Ĝi estas havebla, en bela tolbindaĵo, ĉe Flandra Esperanto-Instituto en Kortrijk.

Por la mendoj kiuj atingos nin dum la monato decembro, ni fiksis specialajn kondiĉojn : la prezo estas 32 fr. inkluzive sendkostojn ; krome ĉiu aĉetanto ricevos donace belan silkan legosignon, kun enteksita portreto de D-ro Zamenhof.

Ĉiu Flandra Esperantisto devas profiti tiun okazon por akiri valoran libron kaj belan premion.

Gimnazia Esperanto grupo, collège municipal de Chalons sur Marne, Francujo deziras korespondi kun gekolegoj pri la vivo kaj kutimoj de la gekoleganoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn.

Karaj gelernintoj ! Denove mi estas reveninta por instrui Esperanton en via lando. Kelkajn gekonatojn mi jam renkontis, sed ĉiujn ne, pro tio mi deziras pere de la ligorgano tutkore saluti ĉiujn iamajn gelernantojn kaj bonajn geamikojn. Kiam mi en Flandra Esperantisto, legas pri viaj laboro kaj farado en la grupo, mi ĝojas, sed vi ne sufiĉe ofte uzis la okazon per via revuo montri al la cetera verda Flandrujo ke, ankaŭ vi, la novaj grupoj faras vian eblon por efektivigi la ideon de nia Majstro, Dro Zamenhof.

Daŭrigu kuraĝe kaj ĝis la revido.

Anna Nedergaard.

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol redakcio, administracio aŭ Flandra Esperanto-Instituto, estos ignorataj).

I. N. Newell : BAKŜIS, 10 originalaj noveloj el la vivo de egiptoj. 152 paĝoj, formato 19 X 13. Prezo : 22 fr. broŝ., 28 fr. bind. Eldonis Literatura Mondo, Budapest.

En la amaso da literaturaĵoj per kiuj oni inundis Esperantujon, nur malofte troviĝas verkoj kia estas la nuna. La unua skizo :

« Baŝis » donas la titolon al la libro kaj formas kvazaŭ enkondukan parolon. La dua novelo kondukas la leganton al Port Said kaj kontaktigas lin kun la kosmopolita Egiptujo. Kvankam la diversaj rakontoj estas sendependaj unu de la alia, la aŭtoro tamen sukcesis prezenti tuton, kiu interesas ĝis la fino.

Tamen rimarko : se la libro estas elstara laŭ literatura vidpunkto, ĝi ne estas rekomendinda laŭ katolika moralo.

SILKA LEGOSIGNO, kun enteksita portreto de nia Majstro D-ro Zamenhof. Bela, bone prizorgita portretigo de D-ro Zamenhof, kies vizaĝo kaj subskribo aperas klare sur la blanka fono. Dimensioj 15 X 5 cm. Prezo : 5 fr.

INFANOJ KAJ PATRINOJ — de Dorothy Canfield Fisher. Tradukita de T. J. Gueritte. 175 paĝoj. Tole bindita 3 ŝilingoj 6 pencoj. Aĉetebla ĉe ĉiu Esperantista Librovendisto aŭ ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.)., Anglujo. Eldonita de *The Esperanto Publishing company, Ltd., Anglujo.*

Oni povus indiki multajn kialojn por instigi al la legado de ĉi bonega libro, ĉar ĝi tuŝas problemon kiu interesas grandan parton de la homoj. La problemo mem estas ege grava kaj la konsekvencoj de ĝia solvo sendube multe influas la normalan evoluon de la socio : kiel faciligi la rilatojn inter la malnova kaj nova generacio, kiuj estas la devoj de la unua rilate la edukado de la dua ?

La psikologoj, unue, trovus en la libro riĉan materialon bazitan sur zorgoplena observado de « vivantaj » infanoj, observado kiu ne igas la animon de la infano nura cifertabelo.

Tiuj due, kiuj ofte kontaktiĝas kun infanoj — mi pensas ekzemple pri infanjuĝistoj, instruistoj, advokatoj de junaj krimuloj ktp. — trovus en la verko de Dorothy Canfield Fisher neelĉerpeblan minon da informoj pri la delikata kaj impresebla psiko junula.

Kaj restas fine tria kategorio da homoj — kaj eble ĝi ampleksas preskaŭ ĉiujn — kiuj havas kiel urĝan devon primediti la instruojn de la dirita verko, nome la gepatroj, la estontaj gepatroj, kiuj volas eduki siajn idojn « ĝustadirekte » ; ili lernu en ĝi pensi mem ĝustadirekte kaj rigardi la filon aŭ filinon ne per la okulvitroj de pasintaj principoj aŭ antaŭjuĝoj sed kiel fakton. Tiam sur tiu firma fundamento ili korektu aŭ favoru la primitivajn tendencojn kaj prezentu al la societo realan viron aŭ virinon !

Estu plie dirite ke la libro estas facile legebla kaj katenas la atenton kiel romano, ke la esperanta teksto estas taŭga, flua, ke la gramatikaj leĝoj estas tre malofte « perfortitaj », ke preseraroj malsvarmas.

Libro valora do kaj nepre legenda !

T. V. G.

SANKTA STEFANO.

En la serio de esperantistaj popoledukaj kajeroj, kiujn redaktas Jozefo de Mihalik, profesoro, afergvida prezidanto de Hungara Esperanto-Federacio, aperis la tria, belege ilustrita kajero pri

Sankta Stefano la unua reĝo de hungaroj. Ankaŭ tiu kajero, kune kun la ĝis nun aperintaj kajeroj, servas por konatigi la hungaran kulturon, historion kaj landon al eksterlandaj samideanoj.

La kajero estas mendebla ĉe la redaktoro J. Mihalik SASHA LOM, Hungarujo. — La unua kajero estas skribita pri Franciŝko Rákóczi la II-a, la dua kajero pri Hungaraj brodaĵoj. La prezo de unu kajero estas 2 respondkuponoj ; kiu mendas kune la 3 kajerojn, ricevos ilin por 4 respondkuponoj.

Esperanta Lingva Komitato Akademio

LISTO DE DIFINOJ DE VORTELEMENTOJ.

(daŭrigo).

41. ador' (v tr) = 1. respekti kaj honori kiel dion ; 2. amegi.
42. adres' (s) = 1. preciza loĝloko de persono, difinita per strato, urbo k.t.p. ; 2. surskribo sur koverto aŭ pakaĵo, montranta la nomon kaj la precizan loĝlokon de la persono, al kiu ĝi estas sendata.
43. adstring' (a) = havanta la econ kuntiri la histojn, kiujn ĝi tuŝas.
44. adult' (v ntr) = rompi la geedzan fidelecon.
45. adverb' (s) = vorto, aldonata al nesubstantivo por precizigi ĝian signifon laŭ loko, tempo, kvanto, maniero k.t.p.
46. advokat' (s) = 1. juristo, rajtigita por pledi en juĝejo por la interesoj de procesanto aŭ de akuzito ; 2. iu, kiu subtenas per vortoj aferon, opinion, projekton k. s.
47. aer' (s) = miksaĵo de gasoj, plejparte azoto kaj oksigeno, kiu ĉirkaŭas la teron.
48. aeroplan' (s) = aparato, pli peza ol la aero, sed ka pabla leviĝi kaj moviĝi en ĝi.
49. afabl' (a) = 1. kondutanta amike, kun agrablaj vortoj kaj komplezo ; 2. esprimanta amikecon, ĝentilecon, komplezon.
50. afekt' (v tr) = ŝajnigi ion per nenaturaj manieroj.
51. afer' (s) = 1. ĉio, kio estas en la mondo, konkreta aŭ abstrakta, montrata en nedifinita maniero ; 2. io, kio estas objekto de pensado, laborado aŭ okupado.
52. aflikt' (v tr) = malĝojigi, suferigi morale.
53. aforism' (s) = koncizа, sencoriĉa principo aŭ arto.
54. Afrik' (s) = mondparto, troviĝanta sude de Eŭropo, inter la Atlantika kaj la Hinda oceanoj.

55. ag' (v ntr) = 1. uzi siajn fizikajn aŭ spiritajn fortojn por produkti iun efikon ;
2. uzi rimedojn por atingi celon.

56. agac' (s) = malagrabla sento en la dentoj, kaŭzata de fortaj acidoj.

57. agat' (s) = speco de kvarco kun diverskoloraj vejnoj.

58. agit' (v tr) = 1. malkvietigi, inciti homojn por politikaj celoj ;
2. naski en la animo sentojn, kiujn ĝin maltrankviligas.

59. agl' (s) = rabobirdo el la familio.....

60. agoni' (s) = dolora lasta batalo de mortanto kontraŭ la morto.

61. agord' (v tr) = 1. starigi ĝustan rilaton inter la diversaj sonoj de unu aŭ pluraj muzikiloj.
2. inklinigi iun al iu agmaniero, emigi iun al io.

62. agrabl' (a) = kio plaĉas, plezurigas.

63. agronomi' (s) = scienco, arto kulturi la teron.

64. aĝ' (s) = tempo, dum kiu vivis homo aŭ besto aŭ dum kiu ekzistis objekto.

65. aĝi' (s) = diferenco inter la nominala kaj la efektiva valoroj de la mono.

66. ajl' (s) = vegetaĵo el la familio de liliacoj, uzata kiel spicajo (Allium sativum).

67. ajn (n) = vorto, aldonata al pronomoj, adverboj kaj konjunkcioj por insisti pri la nedifiniteco.



ANTWERPEN. — *Flandrema Grupo Esperantista.* — Nia sekretario, Sro. J. De Ridder, faris paroladegon pri la Biblio. La vigla aplaŭdo montris, ke li sukcesis.

La sekvantan Dimanĉon, la 23-an de Oktobro, ni vizitis la laboreman grupon Turnhoutan, kiu ricevis la viziton de la multnombra klubo el Eindhoven, Nederlando. Ni ĝoje interkonatiĝis kaj ege amuzis nin !

La 25-an de la sama monato nia grupo, en kunlaboro kun la fama Popoluniversitato Herman Van den Reeck, same kiel pasintjaron, ekorganizis vesperkursojn en komunuma lernejo. Gvidas tiujn kursojn nia prezidanto, Sro. Th. Van Gindertaelen.

Plie, je la 9-a de Novembro, ni aŭdis paroladon pri « Maroko » de Fraŭlino Weinsberg, samideanino pola el Krakovio, kiu dum kelka tempo restadas en nia urbo. Ŝi akiris sukceson meritan.

Intertempe tuta la grupo ankoraŭ ĉiam daŭrigas sian traduk laboron ; laboro, kiu ĉiufoje ekestigas disputadoj fervoraj inter la ĉeestantoj, ĝis kiam oni finfine sukcesas elformi el la donita parto tradukon vere literaturan !

BRUSSEL. — *Nia Estas la Estonto.* — La 27-an de oktobro paroladis nia anino A. De Turck pri la rava Svislando kie ŝi libertempis dum du semajnoj. Same faris nia ano A. Ackaert pri Italujo, la lando de sennombraj artaj trezoroj kaj naturbelo. Dum tiuj paroladoj ni unuafoje uzis niajn lumbildaparatojn pri kiuj ni nun disponas dank'al nia bibliotekisto A. Hessens. Ni elkore dankas la cititajn samideanojn kiuj havigis al ni du ĝuplenajn vesperojn.

Pro likvido de la societo « Breughel » ni devis forlasi nian bone konatan ejon en kiu ni dum la sep jaroj de nia ekzistado hejmece kunvenadis. Dum ĝenerala kunveno ni decidis estonte kunveni en « Vlaamsche Club » kiu situas sur la sama bulvardo (Em. Jacqmainlaan 121). Okaze de la ĝenerala ligkunveno, kiu okazos la 11-an de decembro, ni havos la plezuron bonvenigi la liganojn en nia nova moderna ejo.

GENT. — *U. E. F.* — Jen la unuaj literoj de la ofte citita devizo « UNUEGO ESTAS FORTO ». La Gent'aj Esperantistoj diversgrupaj sukcesis tion efektivigi. Por festi tiun unikaĵon, tri el la diversaj ekzistantaj grupoj en Gent aranĝos grandiozan feston okaze de la Zamenhoftago.

Grupo « Roeland » sekcio de Fl. L. E., Gent'aj Laboristoj Esperantistaj kaj Amika Rondo Esperantista intencas regali vin per tre amuziga vespero.

Programo interesplena estas pro la abundo da okazaĵoj : deklamado, kantado, prezentado de Esperantaj kaj flandralingva teatraĵoj ; cigano kune kun dancistino plue ornamos la tuton kaj kiel apoteozo la ĉiam ŝatata dancado.

La festo okazos je sabato la 10-an de decembro 1938. Komenciĝos je la 7½a en la granda salono de kafejo « De Toren », Slypstraat 144, Gent.

Ĉiuj informoj riceveblaj estas ĉe la sekretariejo de U. E. F. Scheepslosserstraat 21, Gent.

La anoj de « Roeland » speciale invitas vin ĉiujn kaj esperas ke FL. L. E. amplekse estos reprezentata.

TIELT. — *Ĉiam pli alta.* — Post nia komenca kurso, donita de Sro. T. B., nia klubo fondiĝis kaj ni havis semajnajn kunvenojn. Dum tiuj kunvenoj ni ripetis la lecionojn de nia instruisto aŭ tra studis lecionon el esperantolibro kaj je la fino de la kunveno, ni havis ĉiam interesan konversacion pri niaj klubaj aferoj aŭ pri alia subjekto. Sed post kelkaj semajnoj venis la monatoj aŭgusto kaj septembro, dum kiuj kelkaj el niaj gesamideanoj ne povis ĉeesti en niaj kunvenoj. Tial ni decidis, dum tiuj monatoj ne plu okazigi semajnajn, sed nur monatajn kunvenojn. Je la fino de sep-

tembro tamen nia instruisto revenis por doni al ni daŭrigan kurson, ne nur por doni tre facilajn lecionojn, sed por instrui nin pri la gramatiko de Esperanto. Nun, je ĉiu lundo, ni havas kunvenon dum kiu nia instruisto interese, klare kaj agrable klarigas la gramatikajn regulojn de Esperanto. Tiel ni tre rapide lernas kaj ni esperas ke, je la fino de la kurso, ni povos bone paroli kaj ankaŭ senerare korespondi. Ĉi-tie nia instruisto donas ankaŭ kurson por komencantoj kaj je la fino de ĉi-tiu kurso nia klubo havos kelkajn novajn membrojn. Ni esperas ke nun ili tre bone lernas kaj ke baldaŭ ili estos fervoraj kunbatalantoj por la kreskado kaj florado de nia klubo.

TURNHOUT. — *La Turnhouta Espero.* — En nia kunveno de la 5a. de oktobro, ni havis la plezuron gastigi Sron. F. Heidler el Ĉeho-Slovakujo kaj nian amikon Sro Van Doren el Antverpeno. Sro. Heidler diris kelkajn vortojn pri sia sortbatita lando, kaj diris ke ni esperantistoj havas taŭgan rimedon por sanigi la malsanan mondon. Estas tre laŭdinde ke niaj pioniroj Sro. Heidler kaj Sro Van Doren ne forgesas nin, kaj ni esperas, ke ni havos ilin ankoraŭ multfoje inter ni.

La 23an. de oktobro nia grupo aranĝis malgrandan feston, okaze de la vizito de sesdeko da nederlandaj gesamideanoj. Antaŭ tagmezo ili vizitis la kastelon, kaj post la komuna tagmanĝo ili vizitis la muzeon. Je la kvina komenciĝis la festo en la salonego « Scala ». Ni rimarkis gesamideanojn el la ĉirkaŭaĵoj, sed precipe la Antverpenanoj ĉeestis plej multnombre. La horo de la Eindhovena grupo « Suda Kruco » aŭdigis kelkajn belajn kantojn, kiuj tre estis aplaŭdataj. Ankaŭ la humoraĵoj de Sro Bergmans, kaj la agrablaj rakontoj de Sro. Arts sukcesoп akiris. La violonludado de Sro. Venmans plaĉis al ĉiuj, kaj la deklamadoj de kelkaj el niaj klubanoj estis ankaŭ tre ŝatataj. La festo daŭrigis per agrabla dancado, kaj vera frateco kaj amikeco regis inter ĉiuj. Ni kore dankas la Eindhovenajn gesamideanojn por la sukcesa festo, kaj esperas baldaŭ reviziti ilin.

WAREGEM. — *« Per Esperanto al la Paco ».* — Dum la pasinta monato ni ĝoje akceptis en nia grupo Sron Krestanov, el Bulgarlando, kiu donis paroladon pri sia lando. — Tiu propagandvespero plaĉis tre al la membroj kiuj deziras ankoraŭ pli da tiaj ekzercoj. — Por la monato de decembro organizos la grupo feston en la salono de « Vlaamsch Huis ». — Tiu okazos la 4an de decembro, je la 4a posttagmeze, kun sekvonta programo : deklamaĵo, interkonatiĝo, tombolo (St. Nikolao-donita per la administracio de « Vlaamsch Huis » kaj poste dancado. — Ni atendas ĉiujn esperantistojn de la ĉirkaŭaĵo en nia esperantista mezo. — Por la monato januaro ni eble organizos Esperantan kurson kun profesoro en kunlaboro kun la grupo de Kortrijk.

« El Waregem nin alvenis la sciigon pri la feliĉa naskiĝo de filino FRIDA, en la familio de Doktoro Sabbe, la laborema Prezidanto de la loka grupo kaj animo de la Esp. movado en la regiono. Korajn gratulojn al feliĉa familio ».

SOLVO DE PROBLEMO 60.

Arane — Regal — Agiti — Natur — Eliro.

SOLVO DE PROBLEMO 61.

Horizontale : Semajno — met, er — monat, kseno — jen, tomat, Irm — ad, lir, te — nikelo, amator — eto, opi — Aprilo, Oktobr. — re, bar, ie — ord, somer, ced — detal, liken — sum, mol — Februar.

Vertikale. — Januaro — medi, perdi — mon, ker, des. — sen, fetiŝ, tuf — etat, lol, same — tolo, obol — an, mi, am, ir — kara, orel — nest, mok, rima — ore, bapti, kor — oni, tio, cel — orto, bien — Merkred.

PREMIOJ.

Sro Damman gajnis la premiojn de 5 fr. kaj 10 fr. por problemo 60 kaj 61.

JARBATALO.

1. — Sro Fr. Couwenberg (622 p.). 2. — Sro T. Van Gindertaelen (605 p.). 3. — Sro R. Iserentant (581 p.)

ATENTU !

PROBLEMO No 63. ERARO. En tiu-ĉi problemo enŝoviĝis eraro de unu litero. Aldonu al Numero 16 : T iĝas L.

NOVAJ PROBLEMOJ.

Por problemo 64 ni forlotos premion de 5 fr. Por problemo 65 unu de 10 fr. Ensendu la solvojn sur aparta folio metu sur ambaŭ nomon kaj adreson kaj ne forgesu glui la konkurskuponojn. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu sendataj antaŭ la 5a de Januaro rekte al Sro *F. Volders Twee Nethenstraat 46, Antwerpen.*



KLARIGA ĈEVALSALTO.

La ĉevalo(ĉ)troviĝanta enla meza kvadrato, povas salti al unu el la ok blankaj kvadratoj. Ĝi do fakte saltas du kvadratojn horizontale kaj unu kvadraton vertikale, aŭ du kvadratojn vertikale kaj unu kvadraton horizontale.

PROBLEMO No 64 MAGIA ŜTUPARO.

1. — Portreto. (R)
2. — Parto de la maldika intesto.
3. — Sovaĝa besto. (R)
4. — Ofereto. (R)
5. — Regnestro en slavaj landoj.
6. — Trompiĝi. (R)
7. — Eksploda subakva aparato.
8. — La rakonta poezio. (R)
9. — Ripozi senkonscie. (R)
10. — Ĥemia elemento. (simb. Os.) (R)

Per la ĉi-kunaj difinoj serĉu, horizontale kaj vertikale, la samajn vortojn.



PROBLEMO. No 65.

O	A	O	O	J	F	N	A	T
K	N	P	L	T	Z	U	A	A
N	R	R	O	N	S	V	U	K
T	O	T	T	E	O	E	R	E
L	D	U	P	*	T	O	O	B
N	A	O.	E	A	P	N	L	E
R	A	N	M	E	K	N	I	O
E	G	N	E	U	E	K	P	I
E	A	J	R	S	S	B	S	R

Pere de la ĉevalsalto el la ŝakludo, serĉu la kaŝitan alvokon al la Esperantistaro, en la ĉi-kuna figuro.

DUA GRANDA LIBRO-LOTERIO

de Flandra Esperanto - Instituto

Instigite pro la sukceso de la loterio okazinta pasintjare, F. E. I. denove forlotumos 50 tre havindajn premiojn en valoro de entute 1.000 frankoj.
La ĉefpremiojn konsistigas la plej belaj kaj valoraj libroj.
La prezo de unu loto estas nur 1 franko!
Kaptu la okazon por pliriĉigi vian bibliotekon por eta sumo!

LISTO DE LA PREMIOJ:

1. Originala Verkaro de D-ro Zamenhof, 605 paĝoj. Lukse bindita.	
2. Historio de Esperanto. Privat. 2 volumoj. Lukse bindita.	
3. Plena Vortaro de Esperanto. 511 paĝoj.	Bindita
4. Groot Woordenboek Van Straaten, 688 paĝoj.	»
5. Beknopt Woordenboek Van Straaten.	»
6. Tra la Labirinto de la E-Gramatiko. Faulhaber. 334 paĝoj.	»
7. Stranga Heredajo. Luycken. Originala romano	»
8. Pro Ištar. Luycken. Originala romano	»
9. Palaco de Dangero. Wagnalls. Trad. el angla	»
10. Aŭstralio, lando kaj popolo. Delsudo & Laiho	»
11. Abismoj. Forge. Originala romano	»
12. Saltego trans' Jarmiloj. Forge. Originala romano	»
13. La Leono de Flandrujo. Conscience	»
14. Paillieter. Timmermans	»
15. Vivo de Zamenhof. Privat. Ilustrita.	
16. La Vojo Returne. Remarque	»
17. La Naiveco de Pastro Brown. Chesterton	»
18. Romano pri Afrika Bieno. Schreiner.	»
19. Pri la origino de l'Homo. Keith	»
20. Jimmie Higgins. Sinclair	
21. De Voorzetsels in het Nederl. & in Esp. Degenkamp.	
22. La Verbo en Esperanto. Glück & Willems	
23. Lingvaj Respondoj. Zamenhof	
24. Ponto al la Praktiko. De Jongh & Feenstra	
25. Sinjoro Longkrurulo. D. Uitterdijk.	
26. Murdo en la Orienta Ekspreso. A. Christie	
27. La Knaboj de Paŭlo Strato. F. Molnar	
28. La Princo kaj Betty. P. G. Wodehouse	
29. La Tempo Maŝino & La Lando de la Blinduloj. H. G. Wells	
30. Princino de Marso. E. R. Burroughs	
31, 32, 33, 34, 35. Per Biciklo al Italujo. K. Šolc	
36, 37, 38, 39, 40. « Juna Vivo » Kantaro. 34 kantoj kun muziknotoj.	
41, 42, 43, 44, 45. Kia Miksaĵo. V. Dorno. Originala teatraĵeto.	
46, 47, 48, 49, 50. Granda bildo de D-ro Zamenhof. Arta eldono 36 — 28 cm. sur dika, glata papero.	

Mendu viajn biletojn al F. E. I., Magdalenastraat 29, Kortrijk, antaŭpagante pere de poŝtĉekkonto no 3268.51.

KUPONO POR LA 64a KONKURSO

KUPONO POR LA 65a KONKURSO

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

Aŭtomata Presejo

H. BRAEKEVELT

Statiedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.
Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.
Liveras al la diversaj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.
Tel.: 1080.

AANGENAAM LEERBOEK

VOLGENS RECHTSTREEKSCHE METHODE

Overvloedig geïllustreerd

Uiterst geschikt voor zelfstudie.
Bestellen bij F.E.I. Kortrijk
12 fr. portvrij.
Korting aan onze afdeelingen.

Presejo "HOOGER OP"

Vrijheid 101.

Arendonk

Zorgeme elfinita presado.

Favorprezoj por Esperantistoj.

Café Nieuwe Carnot

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj manĝajoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo Esperantista (Sekcio Antwerpen de Fl. L. E.)

ĈU VI JAM LEGIS
la amuzan libron :

La Aventuroj de L. R. M. Stultulof la Xa.

dè F. V. DORNO
(La aŭtoro de « Kia Miksaĵo »)

Kion skribis la grava esp-gazetaro ?
Heroldo de Esperanto : « Ĝi estas satiro, iuloke atinganta ĝis grotesko..... Legado certe donos plezuron ».
Sennaciulo : « La verketo entenas sufiĉe por amuzi dum kelkaj horoj ».
Sur Posteno : « Oni legas ĉiam kun agrable-humora sento, ofte kun rido sur la lipoj ».

PREZO : 5 fr.
Mendeble ĉe Flandra Esperanto-Instituto.

Presejo "HOOGER OP" Lavrijsen, Arendonk. Tel. 52